



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

ENHAVO n-ro 15 > • Italio • ESF • Ondo • Verden , AMO 84, daŭripovo • < mar. 7

Tago de la Gepatraj Lingvoj festita tra Italio

Italaj esperantistoj okazigis agadojn en lernejoj okaze de la Tago de la Gepatraj Lingvoj:

- en supera mezgrada lernejo en Padova oni paroligis la malsamdevenajn lernantojn en iliaj gepatraj lingvoj, parolis pri la tago, pri la manifesto de Prago rilate al defendo de ĉiuj lingvoj kaj pri Esperanto. Rezulto: kelkaj lernantoj petis kurson pri Esperanto.
- en alia itala regiono, Toskanujo, loka radio ofertis reklamajn anoncojn por la kurso de Esperanto por instruistoj (projekto www.30oredoro.it de itala instituto kaj la itala sekcio de ILEI) kaj en supera mezgrada lernejo oni parolis pri la projekto. rezulto: baldaŭa semajnfina kurso pri Esperanto por instruistoj.
- en Brescia, urbo de la ĉi-jara itala Esperanto-kongreso, la prezidanto de la itala landa asocio, Luigi Fraccaroli, kaj aliaj lokaj esperantistoj prezentis Esperanton al 1.600 lernantoj kaj 200 instruistoj de la urbo kunligitaj rete al la sistemo de la loka supera lernejo, mastrumata de la reprezentantoj de la studentoj. La filmo de la kunveno estas videbla en Jutubo: <https://youtu.be/3jTRXevaNTw>

Kio okazis en la lernejoj de aliaj landoj?

Demandas kaj raportas Renato Corsetti



Studaj stipendioj de ESF por esploraj laboroj

Esperantic Studies Foundation (ESF) anoncas sian konkurson de 2022 por esplorstipendioj en ĉiuj fakoj de la homaj kaj sociaj sciencoj, precipe se kun rilatoj al interlingvistiko, lingva justeco, interkultura komunikado, Esperanto kaj parencaj fenomenoj.

Interfaka laboro estas bonvena, kaj ĉeffakoj povas inkluzivi lingvistikon, sociologion, historion, antropologion, komunikadon aŭ amaskomunikilojn, sed ne estas limigitaj al ili. Aperta al kandidatoj tutmonde, kun prefero por kandidatoj en Nordameriko kaj la tutmonda sudo, la stipendion oni povas utiligi samtempe kun aliaj premioj kaj stipendioj kiuj ne estas renovigeblaj. La stipendioj honoras la memoron de Marjorie

Boulton, fekunda aŭtoro de teatraĵoj, poemoj kaj prozo en Esperanto kaj ankaŭ la ĉefa anglalingva biografo de L. L. Zamenhof.

ESF, neprofitcela organizaĵo kiu laboras por lingva justeco tutmonde, valorigas inkluzivadon kaj diversecon. ESF ne diskriminacias surbaze de raso, koloro, lingvo, landa deveno, handikapo, religio, aĝo, seksa orientiĝo, aŭ genra esprimo.

ESF celas aljuĝi stipendiojn de po 10.000 USD en du kategorioj laŭ la esploristo: antaŭdoktoriĝa kaj postdoktoriĝa. Vidu sube la plenajn postulojn.

Kandidatoj rajtas esti por stipendio por la esplorado de doktoriĝanto, kiu jam komencis aŭ tuj komencos sian disertacion aŭ por jama doktoro, kiu lastatempe doktoriĝis per sia disertacio kaj bezonas subtenon al ligitaj esploroj kaj eldonado.

Pliaj informoj: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj-marjorie-boulton/>

Krome, el lastatempa bulteno

<https://www.esperantic.org/en/marjorie-boulton-fellowships/> (angle)

<https://www.esperantic.org/eo/stipendioj-marjorie-boulton/> (esperante)



Aktiva tutvive: la plurjara vic-prezidanto de UEA



La 25an de februaro 2022 forpasis **Claude Nourmont** (1945-2022), kiu ekde sia junaĝo dum pli ol kvindek jaroj diversmaniere aktivis en la movado. Ni funebras kaj kondolencas. Legu pli en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” <https://sezonoj.ru/2022/02/nekrologo-66/>

Alia virina heroo en la movado

En la reto estis publikigita intervjuo kun Halina Gorecka (Kaliningrado, Ruslando), la Esperantisto de la Jaro 2021. Ĉi tiu intervjuo, aranĝita de Paŭlo Fischer-Kotowski, premiere aperis antaŭ unu monato en la decembra (vintra) eldono de “La Ondo de Esperanto”. Legu ĝin ĉe <https://sezonoj.ru/2022/01/gorecka-11/>

Datrevenoj en marto

La 2an de marto 1972, ekzakte antaŭ 50 jaroj, forpasis Cecil “Tiny” Goldsmith, administranto de BEA, sekretario de tri UKoj en Britio, direktoro de UEA/IEL, ĝenerala sekretario de UEA, redaktoro de “Esperanto Internacia”, eldonisto, tradukanto... Legu la liston de Esperantaj jubileo kaj datrevenoj por marto 2022, kompilitan de la Kaliningrada ĵurnalisto Aleksander Korĵenkov, en kiu listo estas ankaŭ Hasegawa Teru (Verda Majo), Viktor Sapojnikov, Julio Baghy, Alfred Michaux kaj aliaj konataj esperantistoj <https://sezonoj.ru/2022/03/marto-9/>

VERDEN por AMO komence de aprilo

En novembro 2021 okazis en la urbo Parmo de norda Italio la unua ĉeesta kunveno de la projekto VERDEN. Kiel la samtempe Esperantema kaj ekologi-ema nomo montras, temas pri projekto, financata de la programo Erasmus+ de Eŭropa Unio, por kune pripensi novajn formojn de daŭripovaj evoluo kaj transporto pere de la Internacia Lingvo. La eŭropaj partneroj, sub la kunordigado de UEA, estas IFEF, Internacia Fervojistista Esperanto-Federacio (precipe la sekcioj de Ĉeĥio kaj Francio), BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), FEL (Flandra Esperanto-Ligo) kaj Esperanto-Asocio de Parmo, membro de Itala Esperanto-Federacio.

La sekvaj renkontiĝoj de la projekto okazos ĉe Kastelo Greziljono en Francio (kun AMO 84), en Pardubice en Ĉeĥio, Roterdamo en Nederlando, Loveno en Belgio kaj fine en julio 2023 dum la UK de Torino en Italio. Tiam estos prezentataj la projektaj rezultoj ankaŭ

en libra formo. Tio estas la unua ekzemplo de 3-jara projekto de UEA financata de Eŭropa Unio. Pro tio kaj pro la fakto, ke ĝi celas proponi novigajn rezultojn por pli larĝa socio, ĝi meritas la nomon de 'pilota projekto, kiun la prezidantino de IFEF, Rodica Todor, donis al ĝi. La temo de la tuta projekto estas 'Aktiva Edukado pri Daŭripova Evoluo kaj Daŭripova Transporto'. La temo por AMO 84 estas 'Fervojo por daŭripova transporto'. La projekta retejo bezonas plian laboron!



<https://bemi.tejo.org/projekto-verden/>

La sekva seminario kaj AMO 84 okazos en la Kulturcentro Greziljono.

Tritagaj diskutadoj okazis en Parma; lerte gvidis ilin Francesco Maurelli kaj Sara Spanò, reprezentantoj de UEA kaj de Kosmo, la firmao, kiu helpis en la verkado de la peto por financado fare de EU. Publika evento estis gastigata en la prestiĝa sidejo de la historia biblioteko de la benediktana monaĥejo Sankta Johano, kies pastro Gustavo Zanolis estas la prezidanto de la Parma Esperanto-Asocio 'Giorgio Canuto'. Bruĉjo Kasini tie parolis pri la projekto „30 Oraj Horoj”. Kvar konkretaj sugestoj por projektoj pri daŭripova transporto tie evidentiĝis. Du estis proponitaj de Lars Sözüer, Ĝenerala Sekretario de BEMI. La unua temas pri monda mapado de ne plu



uzataj fervojoj, kiuj estas jam konvertitaj al biciklovojoj aŭ povus tiel esti (**sed nur, se estas nula eblo remalfermi fervojan servon – averta komento SMG**). La avantaĝo de tiu solvo, krom pli facile pretigi vojon por bicikloj, estus savi por la publiko terenon, kiu povus denove facile iĝi fervojo, se la estontaj cirkonstancoj tion ebligis, helpante verdan konvertadon anstataŭ pliajn aŭtoŝoseojn. La foto montras trajnon al *Mountain View* en

Kalifornio, ege sport-turismanloko. La dua projekto estas ĝisdatigata kolekto de informoj pri la ofte malsamaj internaciaj reguloj pri la kunportado de biciklo dum trajnaj vojaĝoj. Tio multe helpas la planadon de verdaj vojaĝoj por biciklemuloj kaj la laboron de fervojistoj. La tria sugesto venis de Vito Tornillo, Ĝenerala Sekretario de IFEF, kiu per sia prelego diskonigis kelkajn jam ekzistantajn praktikojn uzi pli verdajn

energifontojn sur trajnoj kaj en stacidomoj, kiel en la kazo de la fotovolta kupolo de la stacidomo de Torino Porta Susa, Italio. La inĝeniero Franco Bressanin de Parmo aldonis finan proponon kadre de sia ekologiema instruado al junuloj, montrante manierojn 'verdigi' kaj beligi trajnoj kaj stacidomojn per facile prizorgeblaj plantoj, kiuj bezonus nur malmulte da akvo kaj zorgo
(<https://www.youtube.com/watch?v=9PLHS9-mJN0&t=40s>).




La projekto VERDEN estas interesa por ILEI, ĉar ĝi strebas akompanigi la ekologian pripensadon kun la daŭripova konscio de Esperanto en la lingva kampo. En Parmo Luigia Oberrauch instruis Esperanton al du komencantaj kaj entuziasmaj ĉeĥaj studentoj de la Universitato Pardubice. Bruĉjo Kasini, la prezidanto de la LKK de la ILEI-Kongreso de Massa en 2023, venis el Pisa por prezenti la projekton '30 Oraj Horoj', frukton de kunlaboro inter ILEI, Itala Instituto de Esperanto kaj la Esperanto-Grupo de Massa. Temas pri instruado de Esperanto al volontulaj instruistoj de superaj mezlernejoj de la itala regiono Toskanio, kiuj poste instruos ĝin al siaj gestudentoj. La celo estas pretigi ilin profiti el la interkultura ŝanco ofertota de la mondaj kongresoj, kiuj okazos en Italio dum la somero de 2023. Li rakontis kiel, kun Laura Brazzabeni kaj Enrico Borrello, li sukcesis persvadi la regionajn lerneajn aŭtoritatojn subteni la iniciaton. Lia publika prelego spekteblas en la jutuba kanalo de ILEI
(<https://www.youtube.com/watch?v=eLzcJfPB3U&t=74s>).

La teksto iom koncizigita de artikolo de Alessandra Madella, aperinta en IPR 2022/1, la organo de ILEI.

**La jaro 2022: Jen tio muzike:
kunkantu: DU DI DU DU!**

Dankon al Perlo Miela pro la notoj



===== vortoj: 1265 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.